

## Rutger Dijkstra – Marita Kruijswijk: Frislando, la frisa lingvo kaj la frisoj

### Konciza historio de Frislando kaj de la frisa lingvo



Komence de la mezepoko Frislando etendiĝis de la Belga marbordo ĝis la rivero Vezero en nuna Germanio. La unua mencio de frisa reĝo datiĝas el la sesa jarcento. Lia nomo estis Audulf. En la sepa jarcento Frislando estis sendependa. En la jaro 678 oni menciis la reĝon Aldgillis. Nelonge poste Redbad fariĝis reĝo.

Pri li oni rakontas amuzan anekdoton:  
*Estis kleriko kiu volis bapti lin. Li jam staris kun unu gambo en la baptujo kaj demandis al la kleriko: “Ĉu mi revidos miajn prapatrojn en la kristana postmorta mondo?”. La kleriko diris: “Ne, ili estas en la infero.”*

*Tiam Redbad tuj rapide retiris sian gambon el la akvo kaj respondis: “Se estas tiel, mi preferas iri al la infero anstataŭ iri al la kristana ĉielo!”*

Estas interese scii, ke en la nuntempa Frislando troviĝas la plej granda komunumo de Menonitoj, kiuj nomiĝas Baptistoj en Nederlando!

Redbad mortis en la jaro 719 kaj Poppo fariĝis ĉefo.

Post la aliĝo al la Franka reĝlando en la oka jarcento, Frislando konsistis el tri partoj: la regiono inter la riveroj Zwin kaj Fly, la regiono inter la riveroj Fly kaj Lauwers kaj ankaŭ la regiono inter la riveroj Lauwers kaj Vezero. La unua parto apartenis ekde proksimume la jaro 1000 al la Holandaj grafoj. La aliaj du regionoj konservis sian sendependecon, ĉar neniu sukcesis mastri ilin.

La frisa lingvo oficiale nomiĝas “Frysk”. Ĝi estas indiĝena minoritata lingvo, kiun oni parolas en la nederlanda provinco Frislando. La frisa estas Okcident-ĝermana lingvo, kun parenceco al la nederlanda lingvo.



La unua momento kiam oni menciis la frisan lingvon estas, samkiel kun la nederlanda lingvo, malfacile precizebla. Ĉirkaŭ la oka jarcento la Ĝermanaj lingvoj (malnovaj Saksa, Franka kaj frisa) ne multe diferencis inter si. En la dudeka jarcento estiĝis la Asega-tekstoj. Asega signifas leĝdiranto. En la antikvo Frislando la dudek leĝdirantoj donis eksplikon pri la leĝoj kaj donis konsilon al la ĵurianoj de la tribunalo. Tiuj Asega-tekstoj estas la plej malnovaj skribaj leĝtekstoj en la frisa lingvo.



En la jaroj 1287 kaj 1288 (fine de la dektria jarcento) grafo Floris la Kvina konkeris Okcidentan Frislandon.

En la jaro 1345 okazis batalo inter la Frisoj kaj la Holandanoj ĉe la vilaĝo Warns, proksime al la urbo Stavoro. La Frisoj venkis la Holandanojn. Ekde la kvindekaj jaroj de la lasta jarcento staras tie monumento kun la teksto: “Leaver Dea as Slaaf”; la traduko en Esperanto estas: “Mi preferas la morton anstataŭ sklavecon”. Nuntempe en Frislando ekzistas grupo de frisaj naciistoj, kiuj rememoras la batalon

ĉiujare la 26an de septembro.

En la dekkvara jarcento la urbo Groningeno akiris pli da potenco en Frislando. En la dekkvina jarcento Ulrich Cirksena fariĝis grafo de orienta Frislando. En la jaro 1498 imperiestro Maksimiliano enoficigis la dukon Albrecht de Saksio kiel reĝon de tuta Frislando, sed li sukcesis mastri nur la nuntempan Frislandon en Nederlando. La aliaj partoj de Frislando poste apartenis al Germanio kaj Danlando.


Ĝis la dekkvina jarcento oni uzis la frisan lingvon en la plej granda parto de la nuntempa provinco.

## Frisaj dialektoj

Dum la dekseka jarcento Frislando perdis sian sendependecon. En la jaro 1579 Frislando fariĝis parto de la Respubliko de la Unuiĝintaj Nederlandoj. La regado estis en Holandaj manoj. La norma lingvo estis la nederlanda. La nederlanda lingvo fariĝis la nova lingvo por la lernejoj, la eklezio, la publika regado kaj por la skribaĵoj.

Influj Holandanoj ekloĝis en la frisaj urboj. La frisaj kaj la Holandaj lingvoj kontaktiĝis: jen, la urba frisa lingvo naskiĝis. Kiel rezulto de la polderigo de la Meza Maro, nederlandaj kampuloj ekloĝis sur la nova tero. Ankaŭ ĉi tie du lingvoj kontaktiĝis: la lingvo de Bildt naskiĝis.

Ĝis en la deknaŭa jarcento la frisa lingvo evoluis kiel nur parola lingvo. Ĝi retiriĝis al la kamparo. Tie la lingvo apenaŭ intermiksiĝis kun la nederlanda. La lingvo de la plej gravaj urbanoj estis la nederlanda, la meza klaso parolis la urban frisan lingvon. La skriba frisa lingvo apenaŭ ekzistis, escepte de la poetoj Giacomo Vredeman (Musica Miscella, 1602) kaj Gysbert Japiks (Rymelerye, 1688). Ili verkis siajn poemojn en la frisa lingvo.



En la deknaŭa jarcento, dum la romantika periodo, ekestis por la unua fojo frisa lingva konscio. Naciaj poetoj, kiel ekzemple Joost Hiddes Halbertsma, verkis en la frisa lingvo. Lia teksto “La antikvaj frisoj” fariĝis la nacia himno en la jaro 1875. Estas interese scii ke la melodio de la frisa nacia himno devenas el Germanio.

Dum la deknaŭa jarcento la frisa lingvo ne havis lokon en la publika regado, la lernejoj kaj la eklezio.

Oni konsilis al la instruistoj en la lernejoj ne akcepti “la kamparan lingvon”. Krome, lingvaj normoj ankoraŭ ne ekzistis. Nur en la jaro 1879 oni fiksas la unuan oficialan ortografion por la frisa lingvo. Tamen, antaŭ tio estis la verkisto Waling Dykstra kiu verkis diversajn kolektojn en la frisa lingvo inter 1848 kaj 1875.

En la dudeka jarcento la frisa lingvo komencis denove okupi lokon en la publika regado, instruado kaj juĝaferoj. Komprenoble, la frisa lingva movado aktive kontribuis al tiu procezo.

La hodiaŭa Frislando estas la plej granda provinco de Nederlando, se oni inkluzivas la akvan surfacon kaj la insulojn. Sed Frislando havas, escepte de unu alia provinco, la plej malgrandan densecon de loĝantoj.

## La lingvo en la nuntempa Frislando

### La frisa lingvo en la instruado

En la jaro 1907 oni komencis instrui la frisan lingvon post la oficialaj lernejoj horoj. Tiam la frisa lingvo estis akcesora fako. Ekde de la jaro 1937 estiĝis la ebleco por instruistoj instrui la frisan lingvon dum la lecionoj pri nederlanda lingvo en la pli altaj lernejoj.



Ekde la jaro 1950 naŭ lernejoj komencis eksperimenti kun du lingvoj. Kvin jarojn poste, la Frisa lingvo estis elekta fako en la elementaj lernejoj, kaj la frisa lingvo fariĝis oficiala instrulingvo. Pro ŝanĝo de la instruleĝo en la jaro 1974, ĉiuj frisaj elementaj lernejoj nun havas frisajn lecionojn, sed nur po unu horon semajne.

Nuntempe en Frislando ekzistas cent elementaj lernejoj kaj vartejoj kie oni parolas nur la frisan lingvon. Tio eblas, ĉar la nederlanda konstitucio

havigas la rajton libere elekti la specon de instruado. La malavantaĝo de ĉi tio estas, ke iuj lernantoj havas problemojn pri la ŝanĝo de la elementa lernejo al la mezgrada instruado. Tie oni instruas la fakojn ekskluzive en la nederlanda lingvo. Gravas esplori la rezultojn de instruado ekskluzive en la indiĝena minoritata lingvo, ĉar eblas ke la infanoj malsufiĉe evoluigos siajn lingvajn kapablojn!

### La frisa lingvo en la politiko kaj ĉe la regiona registaro

En Frislando ekzistas malgranda politika partio, la Frisa Nacia Partio. Ĝi dediĉas sin al la konservado de la frisaj lingvo kaj kulturo. La partio aspiras al pli da aŭtonomio por la frisa provinco kaj stimulas la frisan lingvon en la socio. La partio timas ke la kulturo, kiu estas ‘unika’ laŭ la ideoj de la partio, rapide perdiĝas.





En la lokaj kaj la provincaj registaroj oni oficiale uzas la frisan lingvon ekde la jaro 1950, ekzemple en la juĝejoj kaj en la geedziĝaj salonoj. Ekzistas ebleco faras geedziĝajn aktojn en la frisa lingvo. Ankaŭ la urboj kaj vilaĝoj ofte havas nomŝildojn kun du nomoj: la frisa kaj la nederlanda.

La fervoja servo inter Groningeno kaj Leeuwarden uzas ambaŭ lingvojn dum la vojaĝo tra Frislando.



### La amaskomunikiloj

En Frislando ankaŭ la komunikiloj okupiĝas pri la frisa lingvo. En la regionaj gazetoj ofte troviĝas artikoloj pri la frisa lingvo. La Leeuwarden-a Gazeto, la plej granda regiona ĵurnalo, enhavas ĉiutage mallongan bildrakonton en kiu oni preparolas la ĝustecon de lingva fenomeno.



Frislando havas ankaŭ televidan kanalon kaj radiostacion, en kiuj dum la tuta tago estas programoj kaj aktualaĵoj en la frisa lingvo.

### Artoj en Frislando

En Frislando ekzistas tre aktiva movado kiu okupiĝas pri la artoj. Ekde la sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento la movado plifortiĝis.

Frislando havas propran kantfestivalon, kie oni elektas ĉiujare la plej belan novan kanton. En ĉi tiu festivalo troviĝas aparta podio por la

eksterlandaj grupoj kiuj ankaŭ havas minoritatajn lingvojn.

Ekde la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento ekzistas la frisa asocio por popolmuzikistoj, kiu nomiĝas "Tsjoch". Nuntempe la asocio havas proksimume tricent membrojn kaj ankaŭ ni kvar estas membroj.

En la vilaĝoj troviĝas sennombraj teatraj ensembloj, kiuj faras ĉiujare teatrajn prezentadojn en la frisa lingvo. Krome ekzistas teatra ensemblo kiu faras, kun ŝtata subvencio, ĉiujare du aŭ tri grandajn prezentadojn.

Dum la lastaj jaroj ankaŭ frislingvaj filmoj kaj frisa drama serio aperis.

En la kampo de la literaturo ĉiujare multe da libroj kaj poemoj aperas. Frislando havas ankaŭ propran frisan biblio-tradukon.

### Frisoj aliloke

Dum la lastaj jaroj multaj Frisoj transloĝiĝis ekster la provincon aŭ al aliaj landoj. Tie ili ofte pensas pri sia naskiĝlando. En siaj novaj loĝlokoj Frisoj ŝatas kunveni kaj ili fondis frisajn renkontiĝajn societojn. Nuntempe ekzistas dudek sep frisaj societoj en la tuta mondo.

La kalifornia frisino Miranda Blumers faris retpaĝon por frisoj en aliaj landoj. La retpaĝo ebligas al frisoj aliloke mendi frisajn produktojn. Post la mendo ŝi sendas la produktojn al ili. Miranda opinias: "Frisaj produktoj utilas al la konservado de la propra kulturo apud la kulturo de la nova lando".

Frislando festis la jarcentŝanĝon en julio 2000 per granda renkontiĝo, kiu nomiĝis Simmer 2000. Multe da elmigrintoj kaj frisoj el aliaj partoj de Nederlando revenis por ĉeesti la festojn.

### **Por fini**

Nederlando havas dek ses milionojn da enloĝantoj, el kiuj proksimume 640.000 loĝas en Frislando. El ili naŭdek kvar procentoj komprenas la frisan lingvon kaj sepdek kvar procentoj parolas la lingvon. Precipe en la kamparo oni multe aŭdas la frisan lingvon, ekzemple en la butikoj. Sed kiam oni rimarkas ke la alia persono venas el alia parto de Nederlando, oni tuj transiras al la nederlanda lingvo. El la enloĝantoj de Frislando sesdek kvin procentoj legas la lingvon kaj dek sep procentoj scipovas skribi ĝin. Pli ol kvindek kvin procentoj konsideras la frisan lingvon kiel sian gepatran lingvon kaj sepdek ses procentoj sentas sin Frisoj.

Nuntempe la frisa lingvo ĝuas la statuson de oficiala lingvo kun norma ortografio. La lingvo nun havas aktivan lokon en la socio kaj en la instruado. En la jaro 1997 oni ŝanĝis la provincan nomon al ĝia frislingva varianto: Fryslân.

Kvankam oni ne fiksas la agnoskon de la frisa lingvo en la leĝo, ekde la sepdekaj jaroj de la pasinta jarcento kelkaj esploraj raportoj aperis kies aŭtoroj agnoskis Frislandon kiel provincon kun du lingvoj. Pro tio oni konsideras la frisan lingvon la oficiala dua lingvo en Nederlando. Tiuj raportoj ankaŭ rekomendis al la registaro protekti la lingvon kaj la frisan identecon.

La registaro disponigas ĉiujare 1,4 milionojn da eŭroj por la konservado kaj stimulado de la lingvo kaj 450.00 eŭrojn por la frisa kulturo. Bedaŭrinde en la jaro 2007 ĉi tiu politiko montriĝis malsufiĉa laŭ la hodiaŭa eŭropa normo por minoritataj lingvoj...

